# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo februaro 2021**

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La sekretario de Madrida Esperanto-Liceo sendis memorigon de la venonta ĝenerala asembleo, okazonta lundon la 1an februaro, kune kun la diskutotaj dokumentoj.

Se vi estas membro de MEL kaj ne ricevis tiun poŝtaĵon, tio signifas ke ni ne havas vian taŭgan retadreson; do bonvolu sciigi ĝin al ni (madrid@esperanto.es). Dankon!

Kiel dirite, ĝi okazos la 1an februaro 2021, je la 18:00 (unua alvoko) aŭ je la 18:30 (dua alvoko, pli probabla), formale ĉe la sidejo (strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-7 de Madrido). Sed, tial ke la mondo kaj nia urbo pandemias, la kunveno okazos precipe rete. Ĉar jam tri homoj anoncis sian personan ĉeeston tie, bonvolu ne ĉeesti fizike, sed rete. La ligilon oni sendis rekte al la anoj; se vi ne ricevis aŭ forgesis, bv. kontakti kun la supre menciita adreso.

La tagordo estas jena:

1. Raporto pri evoluo de la membraro
2. Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2020
3. Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2021 kaj jarkotizo
4. Diskuto kaj eventuala aprobo de la agad-raporto 2020
5. Diskuto kaj eventuala aprobo de la agad-programo por 2021
6. Demandoj, petoj, proponoj
7. Redaktado, laŭtlego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Memoru ankaŭ tion, ke vi povas transdoni vian voĉdonrajton al alia, se vi planas ne ĉeesti, pere de poŝtaĵo al madrid@esperanto.es.

Se vi ne estas ano, vi ankoraŭ povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/ . La kotizo nun restas la sama, 12 eŭroj jare.

## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

La sidejo provizore plu malfermiĝas dum la lundaj vesperoj, sed memoru ke kunvenoj estis nuligitaj kaj ni daŭre petas ke vi anoncu vin kaj vi prenu la normalajn antaŭzorgojn.

La venonta unuasabata renkontiĝo okazos la 6an de februaro, denove virtuale, pere de la sama kutima adreso https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto. Se vi uzas aplikaĵon Jitsi, uzu la renkontiĝejon "MadridaSabataRenkonto". La babilejo estas malferma por iu ajn esperantisto, komencanto aŭ progresinto, madridano aŭ loĝanto en alia loko

Por informiĝi pri aliaj tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la novan retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com